# *Novaj decidoj pri la ekonomia ordigo surbaze de la popola volo*




**Marino Murillo**

Havano, feb 11 (RHK) Marino Murillo Jorge, membro de la politika buroo de la komunista partio de Kubo, asertis dum la radiotelevida programo Ronda Tablo, ke “tiuj ?i unuaj tagoj ratifas la kompleksecon de la ordiga procezo, kiu transigas ?ion, la tutan socion. Mi ne kredas ke iu ajn homo, restu for de la Ordiga Tasko”.

Akompanate de la ministrino de financoj kaj prezoj, Meisi Bolaños, Murillo elstarigis ke la temo de la ekonomia ordigo estis atente observita de la lo?antaro, tial gravas revui ?ion okazintan dum tiuj ?i unuaj tempoj, interalie, du gravaj momentoj: la tago kiam oni publikigis la anoncon por iniciati la procezon, kaj ses horojn poste la publikigo de de pli ol cent juraj normoj en la oficiala gazeto. Tiuj du momentoj estis je la 10-a de decembro kaj la 1-a de januaro.

Li elstarigis ke tiu ?i procezo okazis en ekonomia momento tre kompleksa, tre limigita pro la sekvoj de la usona sie?o, kiu estis akrigita, la Covid-19, la monda ekonomia krizo kaj la limigo de enspezoj en forta valuto al la insulo.

Tamen, li klarigis ke la fokusi?o socia kaj justa de la kuba Revolucio en tiu ?i ordiga tasko ne perdi?as. Li anka? parolis pri pendantaj aferoj, kiuj ankora? ne fini?is, interalie pri la prezoj, taksado de vundeblaj familioj kaj ricevantoj de la helpa familia sistemo.

Aliaj pendantaj aferoj rilatas al la desegno de tiu ?i procezo, nome pensioj, specialaj proceduroj de socia sekureco, mastrumo de entreprenoj kaj kooperativoj kun malfavora financa situacio cele al solvoj por ties produktiva ciklo.

fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/247410-novaj-decidoj-pri-la-ekonomia-ordigo-surbaze-de-la-popola-volo

**Radio Habana Cuba**